

KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI)

www.ueci.it

"Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue" (Paolo VI)

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 -
Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli -
Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62
stampato da **arena.net** - Grignano di Zocco (VI)

Anno 93 - n. 5
SETTEMBRE- OTTOBRE 2014

20^a EKUMENA KONGRESO

Trento (Cadine – Centro Mariapoli) – 16-23 de Aŭgusto 2014

"Ĉu Kristo estas dividita?" (1Kor 1,13)

Cadine estas malgranda vilaĝo en la komunumo de Trento, iom izolita kaj ĉirkaŭata de montaro. Tie situas la "Centro Mariapoli Chiara Lubich", kie, de la 16a ĝis la 23a de Aŭgusto estis gastigita la 20a Ekumena Esperanto-Kongreso. Temo de la kongreso, "Ĉu Kristo estas dividita", estas la sama, kiu estis elektita por la ĉi-jara preĝ-semajno por la unueco de la kristanoj, kies libreto estis uzita dum la kongreso por la matenaj preĝoj.

Partoprenis 70 homoj el 15 landoj. Inter ili estis 18 italoj.

Sabato la 16a estis la tago de la alveno. Norma kaj Frato Pierluigi helpis ĉe la stacidomoj por alvenigi la kongresanojn al la malproksima kongresejo. Vespere okazis la unua renkontiĝo por interkonatiĝi kaj por komuna preĝo kaj kantado en la granda aŭditorio Athenagora, kiu estos dum la tuta semajno la ĉefa renkontejo. Dum la tuta semajno la sennombraj kantadoj estis akompanataj de Stefan

Lepping per gitaro aŭ per elektra fortepiano.

La oficiala malfermo okazis dimanĉon matene per mallongaj enkondukaj paroladoj de la prezidantoj de IKUE, Giovanni Daminelli, kaj de KELI, Philippe Cousson. Tuj poste, du ge-representantoj de la Movado de la Fajrujoj (*Movimento dei Focolari*), kiu gastigas nin, prezentis la historion kaj la agadon de sia movado, fondita de Chiara Lubich, kaj la historion de la "Centro Mariapoli" de Cadine. La prezentado tre frapis la sentojn de multaj el ni, kiuj ne bone konis la movadon kaj ĝian ekumenan agadon tra la tuta mondo. Sekvis solena dimanĉa diservo celebrata de katolika pastro, Bernard Eichkorn, kaj luterana pastoro, Wolfram Rohloff.

Posttagmeze okazis du prelegoj: de Philippe Cousson pri "Kio post kvin jarcentoj de disiĝo" kaj de Marija Belošević pri "Kvindek jaroj de *Unitatis Redintegratio*". Poste, por la katolikoj, oni celebris la dimanĉan sanktan meson en la kapelo.



Post la vespermanĝo, ĉiutage, Éva Farkas-Tatár, de la reformita eklezio de Budapeŝto, proponis al ni primeditojn el bibliaj paĝoj, ankaŭ ĉerpante el la spertoj de sia naŭdekjara vivo.



(fotis T. Fossati)

La episkopo de Trento kun la du prezidantoj

Lundo komenciĝis, je la 7:00, kiel ĉiuj aliaj tagoj, per la Sankta Meso en kapelo. Je la 10:00, post la matenaj kantoj vizitis nin la Ĉefepiskopo de Trento, mons. Luigi Bressan por alporti siajn salutojn kaj bondezirojn. En siaj vortoj li menciis la apartan alvokon al ekumena agado de la diocezo de Trento laŭ la instigo de papo Paŭlo VI. Li subtenis nian agadon kaj citis siajn spertojn pri la lingvoj, kiam li estis diplomato en la malproksima orienta Azio. Fine li restis iom kun ni por afable konversacii kaj kanti kune en Esperanto el la libro Adoru. Sekvis prelego de Giovanni Daminelli pri “La koncilio de Trento laŭ historia perspektivo” (traduko de la prelego de mons. Iginio Rogger dum UECl-kongreso 2008), poste Norma Cescotti prezentis prelegon pri “La ĉiutaga vivo en Trento dum la Koncilio”. Posttagmeze okazis ekskurso al Rovereto, kie ni supreniris al la monteto *Miravalle*, por admiri la grandan sonorilon, *Maria Dolens*, fandita el la bronzo de la kanonoj el la 19 landoj ba-

talintaj en la unua mond-milito kaj ĉirkaŭata de centoj da flagoj el nacioj de la tuta mondo. Poste ni vizitis en la apuda kvartalo *Borgo Sacco* ortodoksan preĝejon. Dum la tuta posttagmezo akompanis nin Alessandro Martinelli, de la Dioceza Ekumena Centro, kiu zorgis por nia ekskurso, prelegis pri la sonorilo kaj donis la necesajn klarigojn pri ĉio. Post la vespermanĝo, Marjia Beloŝević raportis pri sia sperto ĉe la Universala Kongreso 2014 de Bona Aero (Argentino).

Mardon matene okazis la jarkunvenoj de IKUE kaj KELI. Fine oni decidis aprobi la proponon de Philippe Cousson pri nova Ekumena Kongreso la venontan jaron en Strasburgo tuj post la U.K., kiu okazos en Lille por doni la eblecon partopreni en ambaŭ kongresoj. Posttagmeze estis ekskurso al la ermitejo/sanktejo de Sankta Romeo. Survoje de la reveno estis mallonga haltado por rigardi la kanjonon ĉe la lago Sankta Ĝustina. Vespere, la amatora grupo de junaj dancistoj “Brainstorm”, donis spektaklon de modernaj dancoj.



(fotis G. Daminelli)

Rovereto: Flagoj ĉe la granda sonorilo

Merkredon ni povis ĝui tuttagan ekskurson al Merano. La tuta ekskurso esti organizita kaj zorgata de Alessandro Martinelli, kiu akompanis nin la tutan tagon. Unue ni vizitis la Sinagogon kaj la suban muzeon.



G. Daminelli kaj A. Martinelli en la Sinagogo

Tie ni ricevis interesajn informojn pri la hebreaj ritoj, reguloj kaj kutimoj kaj fine ni kantis en Esperanto la preĝon “*Shemà Israel*”, kiun la observanta hebreo recitas ĉiutage, matene kaj vespere. Poste ni vizitis la luteranan preĝejon, *Christuskirche*, de Merano, kie ni havis informojn pri la preĝejo kaj la evangelia komunumo de la regiono plejmulte germanlingva. Post la tagmanĝo en restoracio per tipa loka plado, ni vizitis la katolikan katedralon kaj aliajn vidindaĵojn de la urbo. Vespete, en kongresejo, ni ĝuis la jidan muzikon de la ensemble “*Il Tamburo del Sole*”.

Ĵaŭdon matene Stefan Lepping prelegis pri la “Genderisma Ideologio (*Gender Mainstreaming*)” Paola Giommoni pri la Komunumo de Bose kaj kelkaj kristanaj simboloj. Marija Belošević montris diversajn E-kristanajn retejojn. Posttagmeze ni vizitis en Trento la Diocezan Ekumenan Centron, kie la respondeculo, Martinelli, raportis pri la historio de la Centro kaj ĝia agado favore de interreligiaj rilatoj kaj de la ekumena edukado en la lernejoj. Tuj poste li mem gvidis nin en la vizito de la Katedralo, de la preĝejo de Sankta Maria la Majora kaj al la antikva preĝejo de Sankta Laŭrenco, kie la du protestantaj pastoroj, Philippe Cousson kaj Wolfram Rohloff celebris la “Sanktan Manĝon”.

Vendredon matene prelegis Siegfried Krüger, kiu parolis pri la unua mondmilito,

Stefan Lepping pri “Memoroj pri disiĝoj kaj paciĝoj inter Di-anoj” kaj Petro Chrdle pri la vivo kaj verkoj de Přemysl Pitter. La posttagmezo estis lasita al la libera volo de la kongresanoj, kies plejmulto iris grupe viziti la urbon. Tio por konsenti la du kunsidoj de la estraranoj de IKUE kaj KELI. Vespete okazis la kutima “Adiaŭa vespero” dum kiu la spektaklo estas aranĝita de la kongresanoj mem. Je la fino oni donis dankan donacon al la tri plej aktivaj kunlaborantoj al la sukceso de nia kongreso: Norma Cescotti, Giovanni Daminelli kaj frato Pierluigi Svaldi.



Merano: Christuskirche

Sabaton matene, la meso, por niaj mortintoj, estis celebrita laŭ la malnova trenta liturgio en la latina lingvo, kiu rekreis en ni la etoson de la trenta koncilio. Post la matenaj kantoj Philippe Cousson, salutis la kongresanojn kaj formulis sian “ĝis revido” en Strasburgo la venontan jaron.

Ni devas esprimi apartan dankon al la fajrujuloj pro ilia afableco kaj helpemo.

Giovanni Daminelli

Trento Centro Ecumenico Diocesano

Il *Centro diocesano per l'ecumenismo e il dialogo interreligioso* di Trento, voluto da papa Paolo VI, svolge un'attività di informazione rendendosi disponibile nell'organizzazione di incontri, seminari, conferenze, collaborando con le istituzioni scolastiche e organizzando momenti di spiritualità specie nella settimana di preghiere per l'unità dei cristiani. Mantiene regolari contatti con le diverse chiese cristiane e con le religioni presenti in diocesi. Mantiene contatti con i patriarchi ortodossi di Mosca e Costantinopoli, con la chiesa ortodossa di San Pietroburgo e con le comunità ecumeniche di Bose, di Taizé e la Conferenza Mondiale delle Religioni per la Pace. Ospita e patrocina il gruppo corale di ispirazione ecumenica *Concilium*, una biblioteca ecumenica e l'associazione locale *Ebrei e Trentino*.

Ecco le parole con cui Paolo VI, l'8 marzo 1964 ha affidato alla città di Trento una particolare missione ecumenica:

*La città di Trento era stata scelta
per facilitare l'incontro, per fare da ponte,
per offrire l'abbraccio
della riconciliazione e dell'amicizia.
Trento non ebbe questa gioia e questa gloria.*

*Essa dovrà averne,
come Noi, come tutto il mondo cattolico,
sempre il desiderio.*

*Essa dovrà assurgere
a simbolo di questo desiderio,
oggi ancora, oggi più che mai,
vivo, implorante, paziente, pregante.*

*Essa dovrà,
con la fermezza della sua fede cattolica,
non costituire un confine, ma aprire una porta;
non chiudere un dialogo, ma tenerlo aperto;
non rinfacciare errori, ma ricercare virtù;
non attendere
chi da quattro secoli non è venuto,
ma andarlo fraternamente a cercare.*

Trento Dioceza Ekumena Centro

La *Dioceza centro por la ekumenismo kaj la interreligia dialogo* de Trento, volita de papo Paŭlo VI, plenumas agadon pri informo estante je dispono en la organizo de renkontiĝoj, seminarioj, prelegoj, kunlaborante kun la lernejaj institucioj kaj organizante okazojn de spiriteco precipe dum la preĝsemajno por la unuiĝo de la kristanoj. Ĝi plutenas kontaktojn kun la diversaj kristanaj eklezioj kaj kun la diversaj religioj ĉeestantaj en la diocezo. Plutenas kontaktojn kun la ortodoksaj patriarchejoj de Moskvo kaj Konstantinopolo, kun la ortodoksa eklezio de Peterburgo kaj kun la ekumenaj komunumoj de Bose, Taizé kaj kun la Monda Konferenco de la Religioj por la Paco. Ĝi gastigas kaj subtenas la ĥoran grupon *Concilium* ekumene inspiritan, ekumanan bibliotekon kaj la lokan asocion *Hebreoj kaj Trentlando*.

Jen la vortoj, per kiuj Paŭlo VI, la 8-an de Marto 1964, konfidis al la urbo Trento apartan ekumanan mision:

*La urbo Trento estis elektita
por faciligi la renkontiĝon, esti kiel ponto,
por oferi la brakumon
de la repaciĝo kaj de la amikeco.
Trento ne povis ĝui ĉi tiujn ĝojon kaj gloron.*

*Ĝi devos havi pri tio,
kiel Ni, kiel la tuta katolika mondo,
ĉiam la deziron.*

*Ĝi devas leviĝi
kiel simbolo de ĉi tiu deziro,
ankoraŭ hodiaŭ, hodiaŭ eĉ pli ol iam,
viva, propetanta, pacienca, preĝanta.*

*Ĝi devos,
firmiĝinta en sia katolika fido,
ne konstrui landlimon, sed malfermi pordon;
ne fermi dialogon, sed teni ĝin malfermitan;
ne riproĉi la erarojn, sed serĉi la virton;
ne atendi tiun,
kiu de kvar jarcentoj ne venas,
sed iri frate lin serĉi.*



MALFERMITAJ AL LA TUTA MONDO

Rubriko zorge de frato Pierluigi Svaldi

DOLCE ATTESA

Chi di noi si rallegra nel vedere qualcuno che riposa tranquillamente? È più facile sentire questa frase: “Mentre riposi, fammi questo favore”. Dio, invece, con piacevole sorpresa, ci ricorda il dovere di riposare. E questo in tempi più duri dei nostri, quando il lavoro era necessario per sopravvivere.

All'interno dei dieci comandamenti suona molto strano l'avvertimento: ricordati di riposare. Eppure è attualissimo: succede spesso di lavorare indefessamente non solo per il bisogno materiale, ma anche per sentirsi necessari o per vincere il senso di inutilità. Ecco allora il desiderio di Dio che si fa pressante fino a diventare un ordine: *«Ricòrdati del giorno di sabato per santificarlo. Sei giorni lavorerai e farai ogni tuo lavoro; ma il settimo giorno è il sabato in onore del Signore, tuo Dio: non farai alcun lavoro, né tu né tuo figlio né tua figlia, né il tuo schiavo né la tua schiava, né il tuo bestiame, né il forestiero che dimora presso di te. Perché in sei giorni il Signore ha fatto il cielo, la terra e il mare e quanto è in essi, ma si è riposato il settimo giorno. Perciò il Signore ha benedetto il giorno del sabato e lo ha consacrato»* (Es. 20, 8-11).

Qui il dovere di lavorare viene limitato ai sei giorni, lasciando al settimo giorno la libertà dal lavoro: e questo per tutti, anche per gli animali. Il rischio di essere schiavi del lavoro è reale. Dio non vuole che l'uomo oltrepassi la misura prescritta, faccia di tutto per sentirsi indispensabile, continui a fuggire dalla sua misera situazione.

DOLÇA ATENDO

Kiu el ni ĝojas vidante iun, kiu trankvile ripozas? Estas pli facile aŭdi tiun ĉi esprimon: “Dum vi ripozas, faru al mi tiun ĉi komplezon”. Dio, kontraŭe, per agrabila surprizo, memorigas nin pri la devo ripozi. Kaj tiu ĉi en tempoj pli malfacilaj ol la niaj, kiam la laboro estis necesa por supervivi.

Ene de la dek ordonoj sonas tre strange la averto: memoru ke vi devas ripozi. Tamen ĝi estas tre aktuala: ofte okazas, ke ni senlace laboras ne nur pro la materia bezono, sed ankaŭ por senti nin necesaj aŭ por venki la senton de neutilo. Jen do la deziro de Dio, kiu fariĝas prema ĝis iĝi ordono: *«Observu la sabaton, por ĝin sanktigi. Dum ses tagoj de la semajno laboru kaj faru ĉiujn viajn aferojn; sed la sepan tagon vi devas dediĉi al la Sinjoro, via Dio. Dum tiu tago neni laboru: nek vi, nek via filo, nek via filino, nek via servisto, nek via servistino, nek via brutaro, nek la fremdulo, kiu estas en via domo; ĉar ankaŭ la Sinjoro dum ses tagoj kreis la ĉielon kaj la teron, la maron, kaj ĉion kio estas en ili; sed en la sepa tago Li ripozis. Tial, la Sinjoro benis la tagon sabatan; kaj agnoskis ĝin sankta»* (Eliro, 20, 8-11).

Ĉi tie la devo labori limiĝas al ses tagoj, lasante je la sepa tago la laborliberecon: kaj tion por ĉiuj, ankaŭ por la brutaro. La risko fariĝi sklavo de la laboro estas reala. Dio ne volas, ke la homo transpasu la preskribitan mezuron, faru ĉion por senti sin nepre necesan, daŭrigu eskapi el sia mizera situacio.

L'invito a santificare il giorno del sabato aiuta l'uomo a riconoscere il suo limite. Quando l'uomo ha fatto la sua parte, è giusto riconoscere che a tutto il resto pensa Dio stesso. Come il bambino che collabora, secondo le sue possibilità, al lavoro dei genitori, accetta di fare poco rispetto a quanto fanno loro, così anche l'uomo è invitato a non sopravvalutare il suo lavoro.

Il pensiero di guadagnare il paradiso con le proprie opere appare come una buona motivazione. Ma il paradiso sarà comunque un dono sorprendente, come il «*tesoro nascosto nel campo*», come la «*perla*» preziosissima trovata dopo tante altre. Non ci è consentito meritare il dono assicurato dopo questa vita. Tuttavia ogni giorno, specie nel giorno del riposo, siamo invitati a contemplare questo dono che Dio ha già pensato di darci, affinché abbiamo l'energia necessaria per fronteggiare i drammi e le miserie della vita.

Sulla stessa linea va messo l'impegno per la lingua internazionale, esperanto. Ci è chiesto e consentito lavorare nei vari campi della vita, e cogliere le occasioni più opportune per favorire l'adozione della lingua internazionale. Ma ci sarà anche chiesto di accettare serenamente che quando succederà sarà una sorpresa per tutti, un dono speciale oltre ogni aspettativa, specialmente per quelli che hanno lavorato di più, consumandosi per questa benedetta lingua. Qualcosa di simile è successo con l'arrivo di questo papa: una sorpresa attesa, ma oltre ogni misura e merito, un puro dono dello Spirito. In attesa di questi eventi lavoriamo con tranquillità, preparando il terreno, affinché il dono di una comune lingua internazionale arrivi all'umanità in attesa come una dolce sorpresa.

La peto sanktigi la sabatan tagon helpas la homon agnoski sian limon. Kiam la homo plenumis sian rolon, oni devas juste agnoski, ke pri la tuta cetero zorgas Dio mem. Kiel la infano, kiu kunlaboras en la laboro de la gepatroj laŭ siaj ebloj, akceptas fari malmulton kompare al tio, kion ili faras, tiel ankaŭ la homo estas petata ne trotaksi sian laboron.

La opinio, ke oni povas gajni la paradizon per propraj faroj ŝajnas bona motivo. Sed la paradizo estos ĉiukaze surpriza donaco, kiel la «*trezoro kaŝita en la kampo*», kiel la tre altvalora «*perlo*» trovita post multaj aliaj. Al ni ne estas permesite meriti la donacon al ni certigitan post tiu ĉi vivo. Tamen ĉiutage, precipe en la ripoz-tago, ni estas petataj kontempli tiun ĉi donacon, kiun Dio jam planis doni al ni, por ke ni havu la necesan forton por alfronti la dramojn kaj mizerojn de la vivo.

Sur la saman linion estu metita la sindevigo pri la internacia lingvo, Esperanto. Al ni estas petate kaj permesate labori en la diversaj kampoj de la vivo, kaj kapti la plej oportunajn okazojn por favori la adoptadon de la internacia lingvo. Sed ankaŭ estos petate al ni trankvile konsenti ke, kiam tio ĉi okazos, ĝi estos surprizo por ĉiuj, donaco speciala trans ĉiuj atendoj, precipe por tiuj, kiuj laboris pli multe, konsumigante pro tiu ĉi benata lingvo. Io simila okazis kun la alveno de tiu ĉi papo: surprizo atendita, sed trans ĉiuj mezuro kaj merito, pura donaco de la Spirito. Atendante ĉi tiujn eventojn, ni laboru trankvile, preparante la grundon, por ke la donaco de komuna internacia lingvo alvenu al la atendantanta homaro kiel dolĉa surprizo.



Dirite inter ni ...



040

MONERO

- Vidu! Vidu!
- Kion?
- Vidu. Tie estas monero.
- Kie?
- Tie, sur la trotuaro.
- Verŝajne iu perdis ĝin.
- Povas esti.
- Okazas.
- Monero, tamen, ne estas granda valorajo.
- Certe, se vi konsideras la nuntempajn monerojn.
- Certe ĝi ne estas ora.
- Sed ĝi povus esti monero malofta.
- Certe ne, eble ĝi falis el la monujo de iu ne tro atenta persona.
- Nu, prenu ĝin.
- Kaj fine ni vidos pri kio temas.
- Jen!
- Tute normala kvincent-lira monero.
- Ĉu normala?
- Jes, kial ne?
- Nu, mi ne dirus, ke ĝi estas ĉiutaga monero.
- Kial
- Ĉar ĝi ne estas itala monero.
- Jes, ke ĝi estas itala!
- Ne, ĝi venas el San Marino.
- Jes, el la Respubliko de San Marino.
- Ĉu vi estas certa?
- Rigardu!
- Jes, estas skribite.

UNA MONETA

- Guarda ! Guarda !
- Che cosa?
- Guarda. Là c'è una moneta.
- Dove?
- Là, sul marciapiede.
- Probabilmente qualcuno l'ha perduta.
- Può essere.
- Succede.
- Una moneta, tuttavia, non è un gran valore.
- Certamente, se consideri le monete attuali.
- Certamente non è d'oro.
- Ma potrebbe essere una moneta rara.
- Certamente no, probabilmente è caduta dal portamonete di una persona non troppo attenta.
- Beh, prendila.
- E finalmente vedremo di che cosa si tratta.
- Ecco!
- Una normalissima moneta da cinquecento lire.
- Normale?
- Sì, perché no?
- No, direi che non è una moneta di ogni giorno.
- Perché?
- Perché non è una moneta italiana.
- Sì, che è italiana!
- No, viene da San Marino.
- Sì, dalla Repubblica di San Marino.
- Sei sicuro?
- Guarda!
- Sì, è scritto.

- Mi neniam vidis ĝin.
- Ĉar vi ne atentis, kion vi metas en vian monujon.
- Povas esti, mi serĉas la kvincent lirojn nur kiam mi bezonas ilin por la ĉareto de la supermarkto.
- Kaj tiam vi vidas nur la formon.
- Jes, interesas al mi nur liberigi la ĉareton.
- Tamen, oni povas trovi multajn neitalajn monerojn inter la normalaj.
- Ĉu nur el San Marino?
- Ne, ankaŭ la Vatikana Stato havas monerojn, kiuj estas similaj al la niaj.
- Ĉu vi trovas ilin facile?
- Nu, ni diru, ke tiujn lastajn oni ricevas kiel restaĵon – iom malfacile – en Romo kaj en la ĉirkaŭaĵoj.
- Kaj tiujn de San Marino?
- Tiuj ne estas tro raraj en Italujo, sed ili pli multe disvastiĝis en Emilio-Romanjo.
- Kompreneble, San Marino estas en la apudaĵoj.
- Iam mi trovis ankaŭ germanajn kaj bulgarajn monerojn inter la ricevitaĵoj kiel restaĵon.
- Tio povas okazi en la grandaj stacidomoj, se vi aĉetas gazetojn, bildkartojn aŭ memoraĵojn.
- Jes, ĉar kelkfoje la turistoj ne havas klarajn ideojn pri la valoro de la moneroj.
- Ĉiam estis tiel.
- Oni devas atenti.
- Nu, ni alvenis.
- Ĉi vi havas la moneron por la ĉareto?
- Certe, mi ĉiam gardas ĝin zorge en mia monujo. Sed... akcidente, mi ne trovas ĝin...
- Non l'avevo mai vista.
- Perché non stai attento a ciò che metti nel tuo portamonete.
- Può essere, cerco le cinquecento lire solamente quando ne ho bisogno per il carrello del super-mercato.
- E allora vedi solamente la forma.
- Sì, mi interessa solamente liberare il carrello.
- Tuttavia si possono trovare molte monete non italiane fra quelle normali.
- Soltanto da San Marino?
- No, anche lo Stato Vaticano ha delle monete che sono simili alle nostre.
- Le trovi facilmente?
- Beh, diciamo che le ultime si ricevono come resto – un po' difficilmente – a Roma e nel circondario.
- E quelle di San Marino?
- Quelle non sono troppo rare in Italia, ma si sono diffuse di più in Emilia-Romagna.
- Naturalmente, San Marino è nelle vicinanze.
- Una volta ho trovato anche monete tedesche e bulgare fra quelle ricevute come resto.
- Può accadere nelle grandi stazioni se comperi giornali, cartoline illustrate o ricordi.
- Sì, perché alle volte i turisti non hanno idee chiare sul valore delle monete.
- È sempre stato così.
- Si deve stare attenti.
- Bene, siamo arrivati.
- Hai la moneta per il carrello?
- Certo, la conservo sempre con cura nel mio portamonete. Ma... accidenti, non la trovo...



BICIKLOJ

- Rapidu!
- Kial?
- Ĉar mi hastas.
- Kien vi devas iri?
- Hejmen.
- Por fari?
- Nu, mi volas sidi antaŭ la televidilo kaj ĝui la spektaklon de la Itala Rondkuro.
- Ĉu komenciĝis la Itala Bicikla Vetkuro?
- Ho, jes, jam de kelkaj tagoj.
- Kaj kio okazis ĝis nun?
- Sprintoj kaj sprintoj kaj sprintoj.
- Ĉu la etapoj estis ebenaj?
- Jes, preskaŭ ĉiuj.
- Kaj la venkintoj?
- Ili devas rivali kun Cipollini.
- Li estas vere granda sprintisto.
- Kaj li ankaŭ estas homo kiu povas doni amuzon al la publiko.
- Sendube.
- Li klopodas sin vesti laŭ la cirkonstancoj.
- Kaj kelkfoje li eĉ ricevas monpunojn.
- Sed tio ne gravas, Ĉar liaj respondeculoj volonte pagas: temas pri propagando por la teamo, kiun li reprezentas.
- Propagando estas kerno de komerco.
- Tio estas vera, sed la konduto de Cipollini estas ankaŭ spektaklo.
- Kaj spektaklo, kiun oni volonte vidas.
- Ĝuste vi diras tion.
- Kial, ĝuste mi?
- Ĉar vi eĉ ne sciis pri la evento.
- Sed nun mi scias.

BICICLETTE

- Muoviti!
- Perché?
- Perché ho fretta.
- Dove devi andare?
- A casa.
- Per fare?
- Ebbene, voglio sedermi davanti al televisore e godermi lo spettacolo del Giro d'Italia.
- È incominciato il Giro d'Italia in bicicletta?
- Oh sì, già da alcuni giorni.
- E cosa è successo finora?
- Volate, volate e volate.
- Le tappe sono state pianeggianti?
- Sì, quasi tutte.
- E i vincitori?
- Han dovuto confrontarsi con Cipollini.
- È veramente un gran velocista.
- Ed è anche un uomo che cerca di dar divertimento al pubblico.
- Senza dubbio.
- Cerca di vestirsi secondo le circostanze.
- E alle volte prende persino delle multe.
- Ma non ha importanza, perché i suoi responsabili pagano: si tratta di propaganda per la squadra che rappresenta.
- La propaganda è l'anima del commercio.
- Questo è vero, ma il comportamento di Cipollini è anche spettacolo.
- E spettacolo che si vede volentieri.
- Proprio tu dici questo.
- Perché, proprio io?
- Perché non sapevi nemmeno dell'avvenimento.
- Ma ora lo so.

- Vi devus rigardi la lastajn kilometrojn de la kuro.
- Kial?
- Ĉar, kiam mankas malmultaj kilometroj, la ekipo de Cipollini komencas organizi sian “trajnon”.
- Kio okazas?
- Iom post iom preskaŭ la tuta ekipo atingas la unuajn lokojn de la grupo.
- Kaj Cipollini?
- Li lasas labori la aliajn, ĉar lia rolo komenciĝos, kiam finos la aliaj.
- Jes, estas li, kiu devas eltiri la altan noton, tiun elbrustan “Do”, laŭ Pavarotti.
- Ha, vi komprenis.
- Nu, daŭrigu.
- Kiam la ekipanoj lokiĝas unu post la alia, la unua komencas pedali kiel eble plej rapide.
- Kaj la grupo plilongiĝas.
- Ĉar ili iras je 60 kilometroj hore.
- Je tia rapideco oni ne povas eliri el la grupo.
- Kiam la unua trajnano finas sian taskon, li flankeniĝas, kaj jen la dua daŭrigas la laboron.
- Kaj tiel antaŭen.
- Jes, ĝis venas la momento de Cipollini, kiu sprintas sufiĉe longe, kaj esprimas tian potencon, ke malfacile oni superas lin.
- Dovresti guardare gli ultimi chilometri della corsa.
- Perché?
- Perché quando mancano pochi chilometri la squadra di Cipollini comincia ad organizzare il suo “treno”.
- Che succede?
- Un po' alla volta quasi tutta la squadra raggiunge i primi posti del gruppo.
- E Cipollini?
- Lascia lavorare gli altri, perché il suo compito incomincerà quando gli altri avranno finito.
- Sì, è lui che deve tirar fuori la nota alta, quel “Do” di petto alla maniera di Pavarotti.
- Ah, hai capito.
- Bene, continua.
- Quando i componenti la squadra si collocano uno dopo l'altro, il primo comincia a pedalare quanto più rapidamente possibile.
- Ed il gruppo si allunga.
- Perché vanno a 60 chilometri all'ora.
- A quella velocità non si può uscire dal gruppo.
- Quando il primo componente il treno ha finito il suo compito, si fa da parte, ed ecco il secondo che continua il suo lavoro.
- E così via.
- Sì, finché viene il momento di Cipollini, che sprinta abbastanza a lungo ed esprime una tal potenza che difficilmente lo si supera.



Nia eta Parnaso

Rubrica dedicata alla Poesia

Rubriko dediĉita al Poezio


L'AQUILONE

*C'è un aquilone
impazzito d'amore
che volteggia
gioioso
nello spazio infinito.*

*E tu
fanciullo incosciente
non tirare
non stratonare il filo*

*Lascia
che vaghi ancora
fra le nuvole
finché brilla il sole,
finché dura il giorno.*

*Che plani
dolcemente
quando verrà la sera
non lontana...*



LA KAJTO

*Estas kajto
freneziginta pro amo
kiu flirtas
plenĝoje
en la senlima spaco.*

*Kaj vi
nekonscia knabeto
ne tiru
ne skuegu la fadenon.*

*Lasu
ke ĝi ŝvebu ankoraŭ
en la nuboj
ĝis brilas la suno,
ĝis daŭras la tago.*

*Ke ĝi glisu
delikate
kiam venos la vespero
ne malproksima...*

COME STELLE CADENTI

*Come stelle cadenti
l'uno dopo l'altro
cadono i giorni
su questo mare di perla.*

*Perlanceo cielo e nubi settembrine
in quest'autunno incipiente
s'ode sull'onda del vento
il respiro del mare in risacca
nella stasi meridiana.*

*Sottile malinconia del tempo
che va...*

KIEL FAL-STELOJ

*Kvazaŭ falantaj steloj
unu post la alia
falas la tagoj
sur tiun-ĉi perlan maron.*

*Perleca ĉielo kaj septembraj nuboj
en ĉi tiu komenca aŭtuno
oni aŭdas tra la venta ondo
la spiron de l' maro surfanta
dum la tagmeza stagno.*

*Subtila melankolio de l' tempo
kiu foriras...*

Anna Amorelli Gennaro

(esperantigis Norma Cescotti)

Printempa kunveno 2014 – Dua prelego pri:
EVANGELII GAUDIUM
Unua ĉapitro: La misia transformiĝo de la Eklezio

Riassunto: *Papa Francesco ci chiede di uscire dalle nostre comodità per raggiungere tutte le periferie dove gettare il seme della parola di Dio, senza preoccuparci se con il buon grano cresce anche la zizzania, ma godendo dei piccoli successi. Per questo va ripensato il ruolo delle parrocchie, delle conferenze episcopali e dello stesso primato papale. Il nostro messaggio sia semplice senza perdere in profondità e verità: l'amore di Cristo che si è manifestato nella sua morte e resurrezione. Il vangelo per prima cosa ci impegna ad amare Dio nella carità verso gli altri, accogliendo tutti principalmente i poveri, i deboli gli abbandonati: questi siano i nostri privilegiati.*

Eklezio eliranta. La Eklezio devas eliri. En la vorto de Dio aperas ofte la verbo “eliri”: en la Malnova Testamento al Abramo, al Moseo, al Jeremio kaj en la nova Jesuo diris al siaj disĉiploj: “*Iru do kaj disĉipligu ĉiujn naciojn....*”.

Papo Francisko petas nin, kiel Eklezion, eliri el niaj komfortoj kaj atingi ĉiujn periferiojn, kiuj bezonas la lumon de la Evangelio. Se la dia vorto estas kiel la semo, oni devas ĵeti la semon, kiu kreskos, ankaŭ kiam la terkulturisto dormas. Kiam Jesuo ĵetas sian semon en iu loko, li ne restas tie. Li iras antaŭen. La semo kreskos sendepende de lia ĉeesto. Gravas ĵeti la semon de la dia vorto ĉien.

Ni devas preni la iniciaton sen timo, iri renkonte al homoj, serĉi la malproksimumojn, iri ĉe la krucvojojn por inviti la forlasitojn. Oni devas imiti Jesuon, kiu per sia iniciato lavis la piedojn al sia disĉiploj.

La evangelizanto devas sin malpliigi ĝis la humileco por tuŝi la suferantan karnon de Kristo. Oni devas surhavi la odoron de la ŝafoj, por ke ili aŭskultu nian voĉon; Zorgi pri la fruktoj, ĉar la evangelizado

devas esti fekunda, sed oni ne devas maltrankviliĝi, se kun la bona tritiko kreskas ankaŭ la malbona herbo.

La evangelizado estu ĝoja. Oni devas festi pro niaj malgrandaj venkoj precipe per la beleco de la liturgio.

Konvertiĝanta paŝtista agado. - La kutimoj, la stiloj, la horaroj, la lingvaĵo, la eklezia strukturo estu iloj por evangelizi la mondon kaj ne por la sinkonservado.

La paroĥo ne estu velkanta strukturo de elito de homoj, kiuj rigardas sin mem. La paroĥo estas la ĉeesto de la Eklezio en la teritorio, en kontakto kun la vivo de la popolo, de la familioj, kaj kapablu sin reformi por adaptiĝi kun mildeco kaj misia kreiveco al la diversaj situacioj.

Ankaŭ la aliaj ekleziaj institucioj, kiuj estas riĉaĵo por la Eklezio, ne perdu la kontakto kun la loka paroĥo. Oni devas pripensi ankaŭ pri ŝanĝoj en la papa ofico. Jam Johano Paŭlo la 2a petis esti helpata por trovi novan formon en la ekzerco de la papa primateco. La papo kaj la centraj strukturoj de la Eklezio bezonas renoviĝon. Jam la Koncilio sin esprimis favore de kolektiveco de decidoj

de la episkopaj konferencoj kaj de kelka aŭtonomio. La troa centrigo komplikas la vivon de la Eklezio kaj ĝia misia agado.

El la kerno de la Evangelio. Pro la rapideco en la disvastigo de la mesaĝoj, ofte ili estas miskomprenataj kaj la medioj forigas la esencon por enfokusigi pri marĝenaj aspektoj. Pro tio la mesaĝo estu simpla kaj koncernu la esencan kernon de la evangelio, ĉar ne ĉiam la aŭskultantoj konas ĝisfunde la fonajn detalojn de tio, kion ni volas komuniki. Nia propono estu simpla sen perdi profundecon kaj veron.

La kerno de nia propono estas *“la amo de Dio, manifestiĝinta en la morto kaj resurekto de Kristo”*. Ekzistas hierarkio inter la instruoj kaj la dogmoj de la Eklezio. Ĉe la pinto estas la Fido kiu agas per la Karitato. La mizerikordo estas la plej alta el la virtoj. Tion oni devas prikonsideri kiam oni anoncas nian mesaĝon.

Ekzemple: Se paroĥestro dum la jaro parolas dek fojojn pri la modereco kaj nur tri fojojn pri la karitato aŭ la justeco, estas misproporcio kaj estas vualitaj la plej gravaj virtoj. Same se oni parolas pli pri la leĝo ol pri la graco, pli pri la Eklezio ol pri Jesuo Kristo, pli pri la Papo ol pri la Dia Vorto. La Evangelio unue instigas nin respondi al Dio, kiu amas nin, rekonante Lin en la aliaj kaj elirante por serĉi la bonon de ĉiuj. Ĉiuj virtoj servas al ĉi tio. Se tiel ne estus, la tuta konstruo de la Eklezio estus kiel kastelo el kartoj. Oni plu ne anoncus la Evangelion, sed siajn doktrinajn pensojn.

La misio enkarniĝinta en la homaj limoj. Kompreneble, la sociaj, filozofiaj kaj teologiaj sciencoj estas gravaj, ĉar ili povas helpi por pli bone konformigi la doktrinon al la nunaj tempoj kaj al la

malsamaj kulturoj. La formo de la mesaĝo povas esti diversforma, sed la senso estas neŝanĝebla. Oni povas forlasi kelkajn belajn tradiciajn kutimojn ne plu aktualaj, tiel ankaŭ kelkaj normojn aŭ ekleziaj preceptojn. Sankta Aŭgusteno notis, ke estas bone ne troigi aldonante novajn preceptojn, kiu transformas nian religion en sklavecon, ĉar Dio volis nin liberaj. Oni devas akompani kun mizerikordo kaj pacienco la kresko de la personoj. Pro tio la konfesejo ne devas esti torturejo, sed mizerikordejo. Malgranda paŝo antaŭen de pekulo, kiu sin baraktas en malfacilaĵoj, estas pli ŝatata de Dio ol la ŝajne korekta vivo de homo, kiu vivas trankvile siajn tagojn. La sindevigo al evangelizado moviĝas en la limoj de la lingvaĵo kaj de la cirkonstancoj. La misiista koro konscias pri tio kaj ne timas sin malpurigi per la koto de la strato.


Patrino kun malfermita koro. Eliri ne signifas, ke oni devas kuri al la periferioj de mondo sen direkto, sencele. Oni devas halti kaj pripensi, aŭskulti, rigardi, akompani. La pordoj de la eklezio estas malfermitaj al ĉiuj, ankaŭ la pordoj de la sakramentoj, precipe de la unua, la Bapto, sed ankaŭ la Eŭkaristio, kiu ne estas premio por la perfektaj homoj, sed nutraĵo de la malfortuloj. La Eklezio ne estas dogano, sed loko por ĉiuj. Oni devas pripensi pri tio kun prudento, sed ankaŭ kun kuraĝo. Laŭ la evangelio ni devas akcepti ĉiujn, ne nur la amikojn kaj la riĉulojn, sed precipe la malriĉulojn, la malfortulojn, la forlasitojn: ili estas niaj privilegiitaj. La papo konkludas: mi preferas Eklezion, malglatan, vunditan, malpuran pro sia eliro sur la stratoj ol Eklezion malsanan ĉar enfermita en siaj komfortaj certecoj.

Giovanni Daminelli

ARMANDO ZECCHIN FURORAS EN WIKIPEDIO



Kvankam trafita kaj frapita de kancera mielomo, sur kiu nun ŝajnas efiki la kemioterapio studita kaj pretigita de medicinista teamo de Torino, nia asociito Armando Zecchin daŭrigas nutri sian amatan ĉevaleton: lanĉi tra “vikipedio” artikolojn (voĉojn) el katolika aŭ kristana fontoj (kun foje aliroj tra filozofio kaj sciencoj kiel kemio):



nun (fino de aŭgusto 2014) la nombro de tiuj, laŭstatute kontrolataj de la ŝarĝitaj stevaroj, atingas 2168 (en kiu kuŝas la laboro de 7/8 jaroj). Se iu volas kontroli siaokule tiu povas aliri la retejon:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Speciala%C4%B5o:Kontribuoj/Ludovica1>.

Kuriozaĵo feliĉiga! Mi centfoje, kaj ne nur mi, konstatis per taŭgigita tiea retilo, ke tiuj artikoloj estas albordigitaj (iuj pli, aliaj malpli, aliaj multe pli, aliaj neniom) 15 fojojn monate. Se iu volas distriĝi kaj amuzi, multipliku $15 \times 2168 = \dots$

La aritmetika rezulto estas la nombro, per kiu estas ĉiumonate “menciita” aliranto al perkancera morto.

Ho, se ili povus esti propreĝoj por mia animo!

Armando Zecchin

81° Congresso Italiano di Esperanto

Fai della Paganella, Trento – 23-30 – agosto 2014

Tema del Congresso: *Esperanto e nuove tecnologie*

Subito dopo il Congresso Ecumenico di Trento, si è svolto a Fai Della Paganella il congresso della Federazione Esperantista italiana con 223 iscritti di 28 nazioni di cui 127 italiani e di questi 14 UECI-anoj. Come si vede, da qualche anno, questo congresso ha le caratteristiche di un congresso internazionale. Come al solito il suo programma era ricco di eventi, anche contemporanei ed escursioni. Dal nostro punto di vista ricordiamo: la Santa Messa in esperanto di sabato sera, celebrata da fra Pierluigi Svaldi in una chiesa parrocchiale gremita anche da curiosi; le elezioni del Consiglio Nazionale FEI che ha visto tra gli eletti il nostro Gianni Conti, che è poi stato inserito nel Consiglio Direttivo come incaricato dell'attività informativa; le elezioni dell'Istituto Italiano di Esperanto nelle quali è stato rieletto il nostro Giovanni Daminelli che continuerà a svolgere l'attività di segretario dell'Istituto.





Gianni Conti pretigis

Survoje al Cadine

Arcangelo Di Serio fotis

NORME E QUOTE ASSOCIATIVE PER L'ANNO 2014

Associato ordinario <i>con Katolika Sento</i> (SO)	22,00 €
Associato giovane <i>con Katolika Sento</i> (SG)	11,00 €
Associato familiare <i>senza Katolika Sento</i> (SF)	11,00 €
Associato ordinario <i>con Espero Katolika</i> (SOE)	43,00 €
Associato sostenitore <i>senza Katolika Sento</i> (SS)	43,00 €
Associato sostenitore <i>con Espero Katolika</i> (SSE)	86,00 €
Solo abbonamento a <i>Katolika Sento</i> (AK)	10,00 €
Solo abbonamento a <i>Espero Katolika</i> (AE)	21,00 €

È associato giovane chi non ha superato i 25 anni. È associato familiare chi convive con altro associato. Specificare nella causale del versamento la categoria dell'associato, l'anno di nascita dei giovani, l'esatto indirizzo per il recapito del periodico K.S., la destinazione di eventuali offerte.

I versamenti vanno fatti sul C.C. Postale n. 47127675 *Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I.*
 codice IBAN: IT66 R076 0101 6000 0004 7127 675 Codice BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

Nota: Sull'etichetta/indirizzo con la quale avete ricevuto questa copia di *Katolika Sento* è indicata la sigla associativa e l'anno di scadenza dell'abbonamento.

COMITATO CENTRALE U.E.C.I.

Presidente: Giovanni DAMINELLI, via Lombardia 37, 20099 Sesto S.Giovanni (MI) – tel. 02.2621149 – katolika.sento@ueci.it (la residenza del presidente è anche sede dell'associazione)

Vice presidente: fra Pierluigi SVALDI, Belvedere San Francesco 1, 38122 Trento – tel. 0461.230392

Segretario/cassiere: Marco POLITI, Via Montemartini 4, 20139 Milano – tel. 02.5395237

Consulente culturale-religioso: Ida BOSSI, Viale Faenza, 26/7 20142 Milano

Responsabile dei congressi: Giovanni CONTI, via F.Filzi 51, 20032 Cormanò (MI) – tel. 02.66301958

Responsabile culturale: Norma COVELLI CESCOTTI, via E.Fermi 29, 38100 Trento – tel. 0461.925210

Consulente informatico: Tiziana FOSSATI, via F.Filzi 30/A, 20035 Lissone (MB) - tel. 039.464942

Consulente editoriale: Carlo SARANDREA, Via di Porta Fabbrica 15, 00165 Roma – tel. 06.39638129

Assistente Ecclesiastico: mons. Giovanni BALCONI, p.zza Duomo, 16, 20122 Milano

Nota bene: Tutte le comunicazioni alla redazione di *Katolika Sento* vanno spedite al presidente UECl.

AMUZE

Ĉiuj ajn rajtas kontribui sendante al ni siajn humuraĵojn, kondiĉe ke ili estu en Esperanto.



(el www.globa.it - sendis Tiziana Fossati)

Konsilo

Okjara knabino revenas hejmen el la lernejo kun belega lerneja atesto.

La patro trarigardas orgojle la belegajn notojn, sed je la fino li legas jenan rimarkon de la instruistino:

“Maria estas bonvola kaj bon-edukita, sed ŝi parolas tro multe. Tamen mi jam havas ideon por perdigi al ŝi ĉi tiun malbonan kutimon”.

La patro subskribas la ateston kaj aldonas:

“Se via metodo funkcias konigu ĝin al mi, ĉar mi volas apliki ĝin al ŝia patrino”.

Inter geedzoj

- Karulo, promesu al mi, ke se mi mortus antaŭ ol vi, via dua edzino ne surmetos miajn vestaĵojn.
- Certe ke ne: ŝi estas pli alta kaj pli maldika ol vi.

Sciencistoj

Naturalisto, statistikisto kaj matematikisto vojaĝas kune per trajno eksterlande. El la fenestro ili vidas kvar nigrajn ŝafojn. La naturalisto diras:

– Vidu, en ĉi tiu lando la ŝafoj estas nigraj.

La statistikisto korektas:

– Ne, ni nur povas diri, ke en tiu ĉi lando estas almenaŭ kvar nigraj ŝafoj.

La matematikisto atentigas:

– Vere, ni povas diri nur, ke ĉi-lande estas almenaŭ kvar ŝafoj, kies dekstra flanko estas nigra.

Fizikisto

Profesoro konstatas, ke lia trajno startas akurate je la 9h32. Sed post iom da tempo li ekvidas, tra la fenestreto, horloĝon, kiu montras horon 9h20, kaj diras:

– Ho ve! ŝajne mi veturas en la malĝusta direkto.

La rifuĝinto

Homo iris al pastro por konfesi, post multaj jaroj, siajn pekojn:

– Mi pekis. Dum la dua mondmilito, mi kaŝis rifuĝinton en la kelo de mia domo.

– Sed tio ne estas peko. Tute male.

– Sed mi rimarkis, ke li estis bonstata, pro tio mi pagigis al li luon.

– Tio ne estis bela afero, sed vi riskis kaj devis doni al li nutraĵon.

– Dankon, pastro...

Mi havas alian demandon.

– Diru. Pri kio temas?

– Ĉu vi pensas, ke mi devas rakonti al li, ke la milito jam finiĝis?

Vidpunktoj

– Mia edzo, ju pli mi maljuniĝas, des pli li trovas min interesa.

– Ho, li estas tre afabla!

– Ne, li estas arkeologo.

En lernejo

Instruistino parolinte pri la verboj, pridemandas Peĉjon:

– “Mi estas bela”, kiu tempo estas?

– Preterito!

http://www.ueci.it/k_sento/ks_2014/

